




Norvega Esperantisto

E S P E R A N T O B L A D E T

N-ro 1
1973

ORGANO DE NORVEGA ESPERANTISTA LIGO
ĈEFREDAKTORO: JOHAN HAMMOND ROSBACH

3-a periodo
39 a (44-a) jaro
Monata



HAUGESUND

Ĉi-foje la landa kongreso havos lokon en Haugesund kaj ĝi okazos la 2-an kaj 3-an de junio. Nur unufoje antaŭe la klubo en Haugesund aranĝis landan kunvenon; estis en la urb-jubilea jaro 1954. La kluba estraro kaj la klubanaro esperas ke la gesanoj diverslokaj multnombre venos al nia urbo por partopreni la landan kunvenon, kaj ni deziras al ĉiuj koran bonvenon.

Kompare kun niaj najbar - urboj Stavanger kaj Bergen Haugesund estas urbo nova - ĝi fondiĝis en la jaro 1854, kaj havas nun proks. 28.000

loĝantojn. Ĉefaj faktoroj en la urba vivo estas ŝiptrafiko kaj industrio. (En pli fruaj jaroj ankaŭ fiŝkaptado ludis gravan rolon).

La ĉefa vidindaĵo de Haugesund estas la regna monumento "Haraldshaugen", starigita en la jaro 1872. Pasintjare oni grandskale celebris la 1100-jaran jubileon.

La klubo Mara Vento datas de 1935, sed jamen pli fruaj jaroj estis en la urbo modesta Esperanta agado.

oto

La Diamanto

Kelkaj el la plej famaj diamantoj, kiuj ekzistas en la mondo, troviĝas en Irano, kie ili konsistigas parton de la Ŝtata Trezoro. La imperiestro Reza Pahlevi kaj Farah povas uzi ilin dum oficialaj ceremonioj. La krono de la imperiestro enhavas 469 diamantojn, 105 perlojn, 36 smaragdojn, 36 rubenojn. La krono de la ŝaho datigas de 1926, kaj oni kreis ĝin por la kronado de la patro de la nuna ŝaho. En la centro troviĝas unu el la plej famaj diamantoj en la mondo, Darya-I-Noor, aŭ Oceano de Lumo. Tiun diamanton oni portis, en 1739, de Dehli al Irano. Oni konsideras ĝin same bela kiel la fama Koh-I-Noor aŭ Monto de Lumo, kiu hodiaŭ apartenas al la brita kortego kaj ornamas la kronon de la reĝino-patrino.



★

Preposisjonen av oversettes på forskjellig måter til Esperanto. I det hele tatt gjelder det at man oversetter preposisjoner med det ord som gjengir betydningen av den norske preposisjon. Det er uten videre klart at av ikke betyr det samme i uttrykk som "stolt av", "av mangel på", "skjelva av feber". Vi har i første setning i teksten ovenfor et eksempel på at av betyr det samme som blant; da skal det oversettes med el. I mange tilfeller betyr av det samme som på grunn av: "gifte seg av kjærlighet" må hete edzigi pro amo. Når preposisjonen betyr ut av, må det selvsagt bli el: Trinki el glaso. Likeledes brukerviel

Specialan poststampon
ni petis. Mendo kaj sendu
l resp.kup.

Kongresaj letermarkoj.
10 kostas 1 rk. + 1 rk.
por afranko. Adr.: ESPE-
RANTO-KONGRESO, Jupiter-
vägen 8, S-381 OO KALMAR,
Svedujo.



2

når vi lager noe av et stoff: konstrui domon el ŝtono. Uttrykket "av seg selv" gjengis oftest med "per si mem."

Konsisti el heter det som kjent også (bestå av). Når skatten består av berømte diamanter, er det også klart at diamanterne utgjør skatten. Tenker man over hva utgjøre betyr sammenlignet med bestå av, er det klart at konsistigi er rette ord på Esperanto, et ord som nybegynnere (og eldre med) sjelden bruker, og som altså nu kan læres.

Vi henviser også til tidligere avsnitt om objektspredikatsord, og ber leserne spesielt på i dette avsnitt uttrykket konsideras ĝin bela.
Ak III.

Norvega Esperantisto

ESPERANTOBLADET

Redakcio: Johan Hammond Rosbach,
Hans Amund Rosbach.

Adreso de la redakcio: Hulderveien 17 B,
N-1700 Sarpsborg. — (Limdato por
manuskriptoj: la 20. en la monato
antaŭ la apero.)

Abonprezo: En Norvegujo kaj ekster-
lando: n. kr. 12.—

Anonprezoj: 1/4 paĝo kr. 150.—,
1/2 p. kr. 75.—, 1/2 p. kr. 40.—,
1/4 p. kr. 20.—

REDAKTOROJ KAJ PRESISTOJ

Ĉi-foje kelkajn pensojn pri redaktoroj kaj presistoj. La preteksto estas, ke ni ne plu presados ĉe Sæther en Hamar. Tion vi povis tuĝ konstati, ekvidante ĉi tiun numeron. Ni petas pardonon!

La lasta numero en la pasinta jaro estis iom stranga. Eĉ la redaktoro surpriziĝis: la lasta paĝo estas blanka! Kia? La legantoj certe pensis, ke la redaktoro fariĝis maljuna aŭ malsana — ili ja scias jam, ke li estas stranga.

La presejo ĉiam promesis pretigi la gazeton por la fiksita dato — sed neniam fariis. Tre streĉa estis la situacio antaŭ la kristnasko, ĉar la poŝto havas certan limdaton por dissendo de gazetoj, evidente pro la ega trafiko kaŭzita de la poŝtkartoj ktp. Anstataŭ informi la redaktoron, ke iom da materialo mankas, la presejo pretigas la gazeton sen la lasta paĝo — por savi la situacion.

Tial dua korektado de presprovaĵo ne povis okazi. Kelkaj legantoj montris al la redakcio la svarmon de preseraroj en unu el la postsomeraĵoj: tion kaŭzis ĝuste la fakto, ke la presisto ne sendis la duan presprovaĵon. Kaj oni ja fabrikas aron da eraroj dum la korektado de la unua provaĵo. Ekzemplon vi povas trovi en la antaŭkristnaska numero, en la lastmomente

enmetita artikolo (sur la lasta paĝo) — ĝi tute ne estas korektita. Tiel oni do kompostas.

Ni multe klopodis por trovi alian presejon, ne nur pro la ĉiamaj malfruigoj, sed ankaŭ pro la severa altigo de la prezoj. Ni atingis favoran oferton ĉe presejo en Sarpsborg, kiu tamen ne povas presigi nun, ĉar la Esperantaj literoj mankas.

En la lastaj semajnoj okazis multaj telefonadoj inter Sarpsborg, Oslo, Kristiansund, Hamar kaj Rotterdam — nur pro nia gazeto. Ĝisplue ni devas "komposti" (skribmaŝine kaj presigi ofsete. Tio daŭros almenaŭ unu jaron. La legantoj bonvolu pardoni, komprenante, kiom da laborotio donos al la "kompostistoj", kaj kiom da laboro ni havis pro la malfacilaĵoj. Ordinare la preparo de unu numero postulas pli ol dek horojn. Kredu min: ĉi tiu numero postulis multe pli!

Samtempe: bonvolu noti, ke la redaktoro ne estas ekspedisto de la gazeto! Ĉion, kio

gazeto! Ĉion, kio koncernas adresojn kaj sendadon, bonvolu direkti al la ekspedejo en Oslo.

Ĉi tio ne estas plendo. Estas nur defendo. Tempo ne estas abunda varo. Kelkfoje mi devas ŝteli tempon por sukcesi. Sed mi ja faris kaj faras la laboron kun plezuro. Tion pruvas la fakto, ke en ĉi tiu jaro 25 jaroj forpasis post mia transpreno de la redakcio.

Jam plurfoje — tion scias la Estraro — mi petis, dum la lasta jardeko, liberiĝon de la tasko, parte por ke la legantoj havu novajn ideojn, la gazeto novan "sangon", parte por havi plida tempo por mi dediĉi al la verkado, kio iom post iom okupas la pensojn kaj la liberajn horojn. La lastan konfirmon, ke mi tamen faros la laboron dum kelka tempo, mi akompanis per la promeso, ke mi redaktos, ĝis mi estos farinta tiun laboron dum 25 jaroj — kaj tiam mi ekziĝos. Do: jen la ŝanco por personoj, kiuj ŝatus transpreni. Mi povas certigi, ke la laboro estas interesa. Sed pli ol 3000 horoj estas sufiĉe da laboro por unu persono en unu branĉo de Esperanta laboro.

JHR.

3

Sciigoj de N.E.L.

Norvega Esperantisto. Se vi deziras eviti interrompon en la ricevado, ni varme petas vin tuj pagi vian kotizon. - La rek-taj membroj bonvolu sendi sian kotizon (kr. 25,00, familianoj kr. 10,00, junuloj kr. 10,00) al N.E.L. (postgirokonto 100.30), la klubanoj bonvolu tuj pagi al la kluba kasisto. Kaj al la klubaj kasistoj ni same varme petas: bonvolu senprokraste ek-agi por kolekti la kotizojn de la klubanoj, kiuj ankoraŭ ne pagis por 1973, kaj sendi liston kaj kotizojn por la jam pag-intaj klubanoj laŭeble baldaŭ. Antaŭan dankon!

Subtenantaj membroj. Ni petas ĉiujn membrojn, kiuj havas ok-azon por tio, anonci sin kiel subtenantajn membrojn de N.E.L.; la kotizo estas kr. 35,00 (aŭ pli) por unu jaro. Klubanoj far-igas subtenantaj membroj pagante minimume kr. 15,00 aldona al sia klubkotizo.

Apogmembroj. Ni petas ĉiujn membrojn varbi apogmembrojn (kr. 5,00). Ĉi tiu kategorio celas ne-esperantistojn, kiuj estas pretaj apogi nian laboron per malgranda subteno; ili ricevas la jarraporton.

58a Universala Kongreso de Esperanto okazos en Beogrado 28. Julio - 4. Augusto 1973. Turisma Seryo de N.E.L. (s. ino Kirsten Ek, Otto Ruges vei 66, 1345 ØSTERAS, postgirokonto 100.32) planas autobusan karavanon al la kongreso kaj dissendas apar-tan cirkuleron pri la planoj; gi ankaŭ akceptas aligojn al la kongreso.

La kontorfondaĵo dum la lastaj monatoj de la jaro ricevis gojigan alfluon de donacoj, tiel ke la fina sumo estas denove pli granda, ol en la pasinta jaro (1971). Ni permesas al ni daŭre memorigi pri tiu grava donac-fondaĵo. Ĉiu donaco estas tre valora helpo por la ekonomio de N.E.L..

La propagandan fondaĵon kontraŭe ankaŭ en 1972 oni evidente preskau tute forgesis. Tiu fondaĵo i. a. permesas al ni eldo-ni propagand-materialon, subvencii prelegvojaĝojn k.t.p.. Ni tial permesas al ni memorigi la membrojn ankaŭ pri tiu grava fondaĵo.

Taskotabelo por kluboj. - Februaro: La studgvidanto kontrolas la laboron de la studrondoj kaj klopodas fondi novajn. Antaŭ la 15a la sekretario sendas jarraporton pri la pasinta jaro al N.E.L. kaj al la Distrikto (bl. A 11). La kasisto sendas skri-ban kotizpostulon al ĉiuj nepagintaj klubanoj, kun plenigita postgirokarto aŭ postmandato, informante ke post unu monato oni eventuale sendos postan enkasigilon. Estrarkunveno planas la martajn kunvenojn.

Marto: Estrarkunveno planas la kunvenojn de la venonta mona-to. La kasisto sendas postan enkasigilon al la membroj, kiuj ankoraŭ ne pagis sian kotizon.

Raporto de la Liga Estraro pri la 4a jarkvarono. Okazis du estrarkunvenoj, kaj oni sendis unu cirkuleron al la kluboj kaj rektaj membroj (i. a. pri donac-abonoj al Norvega Esperantisto kaj pri nova „Agado Libro“). Ĉar la gisnuna presejo de Norve-ga Esperantisto plialtigis la prezon je 66,67%, oni sercis ali-an, malpli multekostan presejon. Oni planas laboron okaze de la skolta monda jamboreo en Norvegujo en 1975. La Esperanto-klubo „Mara Vento“ prenis sur sin la arangon de la 43a Norvega Esperanto-Kongreso en Haugesund 2.-3. Junio 1973. Oni traktas kun „Folkets Brevskole“ pri la eldono de la reviziita korespon-da kurso, pri eventuala administrado de la kurso per „Folkets Brevskole“, kaj pri eventuala kombino de la kursteksto kun ord-inara lernolibro.

La Liga Estraro.

INFORMOJ DE LA EKZAMENA KOMISIONO.

Ordinaraĵ printempaj ekzamenoj. Ekzamenoj okazos ĉirkaŭ la 1-a de Junio 1973. Instruistan ekzamenon oni povos fari en Oslo, superan kaj elementan ekzamenojn en Oslo, Bergen, Haugesund, Sarpsborg, Sauda, Trondhejmo (la ekzamena komitato en Tromsø provizore ne funkcias). Personoj logantaj en lokoj, kie ne troviĝas loka ekzamena komitato, povos plenumi elementan aŭ superan ekzamenon en Haugesund okaze de la 43a Norvega Esperanto-Kongreso 2. - 3. Junio 1973; ili anoncu sin rekte al la Ekzamena Komisiono en Oslo. Oni anoncu sin per la presi-taj skemoj riceveblaj de la ekzamenaj komitatoj aŭ rekte de la Ekza-mena Komisiono. Oni sendu la skemojn al tiu komitato, ce kiu oni in-tencas fari la ekzamenon, antaŭ la 1-a de Majo. Personoj, kiuj faros la ekzamenon ne en Oslo, plenigu po 2 - du - skemojn. Plenigu la ske-mojn akurate kaj komplete! - Aligoj, kiuj alvenos post la 1-a de Ma-jo, ne estos konsiderataj.

Adresoj de la lokaj ekzamenaj komitatoj:

OSLO: Ekzamena Komisiono, Boks 942, Oslo 1. Postgirokonto 100.34.
BERGEN: S. ro Kjell Offerdal, Sv. Hjetlands vei 6 B, 5031 LAKSEVÅG.
HAUGESUND: S. ro Olav Thormodsen, Boks 59, 5501 HAUGESUND.
SARPSBORG: S. ro Johan Hammond Rosbach, Hulderavn. 17B, 1700 SARPSBORG.
SAUDA: S. ino Elna Matland, Brekkevn. 50, 4200 SAUDA.
TRONDHEJMO: S. ro Erling Anker Haugen, Sig. Bergs alle 12, 7000 TRONDH.

Ekzamena Komisiono de N.E.L.
C. Støp-Bowitz
prezidanto.

La kontorfondaĵo, 1972.

Pli frue	kr. 1102,00
K. Gustavsen	" 20,00
S. Korstvedt	" 45,00
H. Danielsen	" 216,00
O. Nyberg	" 10,00
R. Bugge-Paulsen	" 30,00
„Tommy“	" 10,00
M. Delor	" 100,00
Bodø Esperantoklubb	" 100,00
Elna Matland	" 10,00
A. Refsing	" 200,00
C.S.B.	" 20,00
T. Andersen	" 75,00
S. Møland	" 15,00
O. Møland	" 15,00
Leif H. Bryn	" 30,00
L. Belle	" 75,00
S. J. Ebeltoft	" 6,00
G. Ringstad	" 10,00
W. Gjertsen	" 25,00
	<u>kr. 2114,00</u>

Membro subtenanta 1972:

Aslaug Refsing

Membroj subtenantaj 1973:

Peder Hillestad

Sigrun Møland

Olaf Møland

Anny Somdalen

K. Syversen

Wilfred Hortman.

Sinceran dankon al ĉiuj donac-intoj!

PLORO DE DIANGELO

La diservodimanĉondum Ane staris en la rikanejo pro sia karno - la Giganto sidis hejme en la kabano kaj lulis la bebon surgenue. Kiam la Diangelo ploris, li sencele vagis en klakantaj lignoŝuoj kun ĝi inter la kameno kaj la pordotruo. Kaj dum ĝi pleje ploris, li portis ĝin al la sunplena muro ekstere, ke ĝi aŭdu la zumadon de la muŝoj, kaj la zumetadon de la printempa venteto tra la paduso, - - - ĉar la paduso floris nun. En ĉi tiu nokto la burĝonoj ekfloris. Kaj se tio estis al neniu helpo, li sin kroĉis sub foliaro kaj branĉoj laŭ la vojeto al la akvujo ĉe la rivereto, kaj tenis la Diangelon tute apud ĝi, ke ĝi vidu la multajn belajn kolorojn ludi en la sunakvo.

Neniu helpis. Ankaŭ diangelo povas esti nekonsolebla. Ne, ĝi ne bonfartas surtere! la Giganto pensis; al la ĉielo ĝi sopiras. Li tute ne sciis, kion fari.

- - - La Giganto estis neordinare grandstatura viro. La hararo falis kiel malglatigebla sorĉistimperuko laŭ la ŝultroj. Li jam iomete kurbigis. Kaj bastonon li ekuzis post la tago de missa candelarum. Tion kaŭzis la multaj pezaj ŝarĝoj portendaj tra senvoja sovaĝejo. Sed kiu scias, ĉu li ne portadis pli pezajn ŝarĝojn ol la okulo povas vidi.

Li devis baldaŭ provi malkare aĉetimaljunan tirbovon. La bovinon de la eklezio oni ne rajtas uzi por tiri. La kontrakton - kiun li kun neklaraj okuloj signis per sia simbolo - li parkere sciis. En ĝi staris skribite: "La beston ne al plugilo aŭ glitvagono uzi!"

Kaj jen oni devis tiri kaj porti jaron post jaro.

Kiom aĝa la Giganto estas - almenaŭ proksimume - nur la ĉionpova en la Ĉielo sciis. Antaŭ dudek jaroj li edziĝis pluvplenan tagon kun fulmoj kaj tondro ekster la preĝeja pordo en Lesja. La dekduan printempon la Giganto iris en Jammerdalen sen parulino. Verŝajne li baldaŭ atingos la deksezon. Li konjektis tion. Dia favoro ke neniu konas lian nomon. La baptoateston li forbrulis iun nokton kaj ŝutis la cindrojn en la forta vento. Dio benu la ŝtormon! Li kaŝas siajn duonfilojn per ĝi!

Li - duonfilo de Nia Sinjoro - bonfartas kun sia kromnomo: La Giganto!

Malbona sorto frue estis lia posedaĵo. Dum du jaroj la Giganto sidis en la kastela kelo. Li estis malbenita ĉevalĉestelito. Dum la unuaj jaroj en ĉi tiu valo li ĝismorte timis, ke la malbona famo trovu la vojon laŭ liaj piedtretoj laŭ montoj kaj pintoj.

El ĉiuj ŝarĝoj la pasinteco pleje pezis.

Jes, pli ol ŝtono kaj tero. La ĉionscia - kiu sciis, kionli dum la jaroj de junuleca stulteco misfaris al leĝo kaj justo - per sia graco baris kaj ŝlosis, ke la famo ne disiru. Ĉi tie li estas la Giganto. Ke li uzas falsan signon oni certe pardonos en la tago de Juĝo.

Certe estis malbone ke Ane kuniĝis kun Ole Soldato tie en Hovi kaj pro tio devas stari en la rikanejo. Sed tio estas nenio kompare kun juĝo al feroj. Se nur nenio ekscios, ke ŝia patro venis de la sklavejo la rikanejo iom post iom forgesiĝos. Ankaŭ ĝi finfine kaŝiĝos en sia propra ombro - - - La Giganto peze spiris.

Sippereo surtere estas pli malbona ol surmare - ĉar la maro ja havas strandon.

Nun denove la kompatinda An-Magritt ekploris.

Dormu nun! Dormu nun! La Giganto staris kruda kaj raŭka - la kanto

similis al la ululo de montara lupo. Kaj de la strigo en la nebulo. An-Magritt en la bapto estis renomata de neniu. Li neniam kuraĝus tion. Nomoj povus doni al homoj indikilon. Sed pro tio ŝi apenaŭ similos al la parencoj - ĉar kies nomon oni portas oni heredas korpe kaj anime. Ankaŭ la heredatan pekon!

Dormu nun!

La preĝejaj sonoriloj vokis al eniro. Li povis aŭdi tion ĝis en la kabano. La sonoriltono falis tra la fumtruo en la plafono. Kaj An-Magritt silentis kaj ridetis. En sia mizero li komprenis tion signon, ke la savanto de la mondo Jesuo Kristo akceptas ŝin.

Kiam Ane revenis de la preĝejo la Giganto metis la infanon al ŝia mammo - ĝi suĉis sangon. En despero li faris krucosignon.

Giganto-Ane perdis sian saĝon kaj komprenon en tiu dimanĉo. Ŝi ripetadis plende ke estas nur nokto kaj neniu tago. Kaj malmulte helpis, ke la patro ĉiam denove montris al la sunokulo inter la nuboj.

Ane! Ĉu vi ne povas vidi la klaran tagon de la Sinjoro!

La venanta preĝej-dimanĉo dum la sonoriloj vokis al anima savo, Ane sin ĵetis en la akvofalo Ea. Laŭ la leĝo ŝi staru en la rikan-ejo dum tri diservoj.

En la antaŭĉambro de la preĝejo la viraro denove blasfemadis: En kiu leĝo de la Satano la pastro legis pri la tri diservoj?

Je feliĉo al la eklezia leĝfaranto en la leterĉambro neniu kapablis kunmeti plendoleteron al preposto kaj episkopo. Ankaŭ ne aperis vermoj en la imposto-fromaĝo. Diabla Wittenbergulo!

Iun nokton somere la dommastrino en Hovi vekigis ĉar la Giganto staris en la lunbrilo ĉe la pordo kaj prezentis An-Magritt al ŝi.

Benu vin - - flustris la Giganto. An-Magritt devas suĉi ĉe via brusto kvaronhoro. Alie ŝi mortmalsatas al mi.

Mi nur havas sufiĉon al mia propra infano - respondis la Hovimatrono kaj turnis sian dorson al li.

La Giganto falis surgenue kaj petegis: Nur dum kvaronhoro! Dio vin rekompencos!

Ĉiutage laŭ la vintro oni vidis la grandan Giganton kuradi tra neĝvetero kaj ventoj inter la bienoj kun An-Magritt ĉe sia sino. Li portis ŝin en ĝispieda antaŭtuko. Kaj ĉie, kie estis suĉbeboj li petegis suĉon al la malgranda senpatrina knabino.

Kiam li entretis li uzis dunne preĝejaj saĝecsentencojn:

En la zorgego de mia maljuneco mi venas por petegi manaon al iu malsata Diangelo!

Kaj tiamaniere li savis la vivon de An-Magritt.

(Laŭ la dua ĉapitro de la romano "Pano de la Nokto" de Johan Falkberget)

FERVOJISTA PAĜO

ORGANO DE NORVEGA
ESPERANTISTA FERVOJISTA
ASOCIO - NEFAKaldbakktubben 22, Oslo 9
Redaktoro: Odd Kolbrek,LA HISTORIO DE LA
RJUKAN-LINIO.

Eltraĵo de parolado de la ĉefingeniero de la Rjukanlinio, s-ro
Thorbjørnsen.

La nomo de la linio devenas de la akvofalo Rjukanfossen kaj de la Rjukanestablaĵoj, kaj ĝia historio paralelas kun la konstruado de la elektrejoj kaj fabrikestablaĵoj en ĉi tiu valo kiu nomiĝas Vestfjordalen.

"Norsk Hydro Elektrisk Kvalstof aktieselskab" (azotfabriko) starigis 2.12.1905 en Notodden en Telemark kaj poste oni komencis eluzi la 200000 ĉevalpovojn de Rjukanfossen kiu apartenis al ĉi tiu entrepreno kiu poste konstruigis la fabrikestablaĵojn Rjukan Sälpetrocentrepreno kaj tie fondiĝis la industri-centro Rjukan. Absoluta kondiĉo estis laŭracia kaj sekura transportebleco inter Vestfjordalen kaj la plej proksimesituanta haveno ĉe Skien. Tiutempe, en 1907, ĉi tiu regiono situis tre izolita. Laŭ ĉi tie situanta lago Tinnsjøen okazis modesta vaporboattrafiko De ĝia suda finpunkto Tinnoset estis vojo al Notodden kaj de tie oni pere de malgrandaj boatoj povis vojaĝi laŭ kanaloj al la marbordo kaj en ĉi tiu distrikto ne estis fervojoj. Tial oni devis konstrui fervojliniojn de Rjukan al Mæl, situante preskaŭ ĉe la norda finpunkto de Tinnsjøen kaj de Tinnoset al Notodden. Laŭ la lago oni planis transporti la fervojvagonojn pere de ŝarĝboatoj. 27.3.1907 oni petis al la "Departemento por Laboro" pri koncesio pri konstruado de normalŝpuraj privatlinioj inter Notodden kaj Tinnoset kaj inter Rjukan kaj Mæl.

La linioj estus konstruigotaj kaj funkciigotaj de "Norsk Transportaktieselskab" sen monkontribuo nek de la ŝtato nek de la komunumo. La koncesio doniĝis 27.6.1907 kaj 8.7.1907 komencis la konstruado kiu konsiderante al la tiutempaj labormetodoj bone progresis samtempe kun la konstruado de grandaj tuneloj por elektrado.

La linio provizore aplikiĝis en februaro 1909 kaj oficiale inaŭguriĝis 9.8.1909 en Notodden de Reĝo Haakon VII kaj kun ĉeesto de la tiama Ŝtatministro Gunnar Knudsen. Post la inaŭguro la trajno veturis norden al Tinnoset, kie oni rigardis la digon Tinnosdammen. Poste oni vojaĝis al Mæl pere de la motorboato Hydro Jarl kiu estis bele ornamita, kaj de tie oni trajnis al Rjukan, kie en la administraciadomo okazis granda festo.

Ne nur de fabrikestablaĵoj, sed ankaŭ de fervojaj vidpunktoj la linio havis vitalan signifon. Tiutempe estis "fervojfebrego" kaj oni devis esti pioniroj je diversaj kampoj.

Daŭrigota.

La internaciaj ferioj Esperanto-kursoj en Helsingør

22. - 29. de Julio 1973.

Ni invitas vin veni al Helsingør (Elsinoro) por ĉeesti niajn internaciajn feriojn kaj kursojn, konatajn en la tuta Esp.-mondo, car ili funkcias jam 40 jarojn. Ordinare ĉeestas pli ol 100 personoj el 10 - 15 diversaj landoj. - Tie vi havos rican eblecon de konversacia ekzerco kaj por trovi internacian amikecon kun multaj diverslandaj gesamideanoj.

- Nur antaŭtagmeze okazas la instruado - en jenaj kursoj:
- 1) Elementa kurso laŭ metodo Friis. Ĝin povas partopreni anoj diversnaciaj, car la metodo estas internacia kaj aplikas nur Esperanton. Per tiu metodo oni lernas pli multe ol per alia metodo dum unu semajna.
 - 2) Konversacia kurso. Multaj samideanoj bezonas parolekzercon, kaj tial ĉi tiu kurso estas tre grava. La gvidantino scias paroli ĉiujn en bonhumora kaj gaja maniero.
 - 3) Perfektiga studrondo. Stilo kaj formo de nia lingvo estas la ĉefaj temoj de la studronda studado kaj diskutado.

Feriosemajno en Nederlando.

Esperanto-klubo "Unueco", Krommenie/Assendelft, Nederlando, organizos denove de la 5a ĝis 12a de Aŭgusto 1973 la 19an Internacian Esperanto-feriosemajnon. Ĝi ne pre okazos!

Oni gastloĝos senpage ĉe Esperanto-familioj.

Oni pagos nur por la ĉiutaga ekkursoj: 150,00 ned. guld. aŭ 30,00 dol.; ni prezentos belan programon.

Limdato de aligo: 15a de Junio 1973. Informoj, propektoj senpage haveblaj ĉe: Esperanto-klubo "Unueco", Krommenie/Assendelft, Nederlando, Sino J.A.v.d.Meulen, Popelstræt 13, Krommenie, Nederlando.

- 4) Prepara kurso por Friis-metodaj ĝeinstruistoj. Ĉi tiu metodo - simila al NATURMETODO - estas la metodo de la moderna tempo. Tial ankaŭ ni devas apliki ĝin. Tial ni invitas vin veni ĉi tien por studi ĝin praktike - - - kaj vi miros pro ĝiaj bonegaj rezultoj. Kurso n-ro 1 estas parto de ĉi tiu.

NB. Ankaŭ Ne-Kursanoj estos kore bonvenaj en ĉi tiu semajno.

Venu por ĉeesti nian internacian semajnon! Neforgesbla estas tia feria tempo en la sincere amika atmosfero de niaj kursoj. Tial ne prokrastu la aligon, sed sendu ĝin baldaŭ (antaŭ 1/7 73) al

s-ro L. Friis,
Ingemannsvej 9,
DK-8230 ÅBYHØJ,
Danlando.

NB. La kurskomitato ne deziras antaŭpagon de la kurskosto. La kurskasisto akceptos la pagon en la dua kurstago.

Estimata Hipopotamo!

Mi loĝas en la 6-a etaĝo. En la 12-a etaĝo loĝas familio, kiel sesjara filo ĉiutage malsuprenvenas per la lifto. Post restado en la infangardeno li revenas hejmen, kaj supreniras per la lifto, sed nur al la 5-a etaĝo. Post tio li kuras la ŝtuparojn. Saĝa Hipopotamo, kie povas esti la kaŭzo, ke li ne supreniras ĉiujn etaĝojn per la lifto?


Liftpasaĝero.

S-ro Liftpasaĝero!

Ĉu vi pripensis, ke la knabeto verŝajne ne estas tiel granda, ke li povas premi la butonon por la 12-a etaĝo?

Hipopotamo

GANGDØRA



Vals (lit langvort) Musik: Elis Oksa

Ni kantas pri gloro kaj pri la naturo,
pri devo kaj pri la amor',
sed kantis neniam ĝis nun trubaduro
pri l' pordo de la koridor'.

Tre bone komprenis ĝi kio okazis
dumnokte pri la rendevu',
pri li kiu vin en kolero forlasis,
kaj kiu revenis ne plu,
pri li kiun vi petis ne plu foriri,
pri li kiu vin provis vane akiri.

Okazis ke ĝi havis kaŭzon por rido,
sed sonis de l' klinko ne knar',
ec ne kiam daŭris pri la "Ĝis revido"
post horo la tria aŭ kvar.
Neniam la pordo pri io komentis,
ĝi kiel nur pordo kapablas, silentis.

Ĝi vidis larmeton ekbrili okule,
rideton post lia kares'.

Ĝi scias ĉu knabo ŝin ofte vizitas,
cu li restas longe aŭ ne,
kaj kiam ŝi lin en la cambron invitas,
li ŝtrumpe ŝteliras, sed ve,
je lia eliro montranta sinkulpon
la pordo per knaro timigas la vulpon.

La koridorpordo egale kondutas
al nobla sinjor' aŭ fripon',
kaj estas plej bone ke ĝi tute mutas,
ne klacas pri iu person'.

Originalo de Marie Lovise Widnes.
Traduko de Johan Matland.

ni legis
en „Jankogila“

LA FILATELO KIEL KURACRIMEDO

Oni scias, ke multaj malsanoj, precipe la kaŭzataj de perturboj de la nerva sistemo, estas kuracataj per havigo de kondiĉoj por agrabla okupiĝo de la malsanuloj.

En 1950 en Pollando ĉe unu el la infansanatorioj grupo da pedagogoj, kiuj post longa observado konstatis, ke preskaŭ ne estas infanoj, kiuj ne okupiĝas pasie pri poŝtmarkoj, petis la direktoron de la sanatorio permesi al ili realigi eksperimenton, klarigante al li sian planon.

La direktoro permesis, kaj la pedagogoj, helpate kaj observate de la kuracistoj, formis du eksperimentajn grupojn de malsanaj infanoj. Ambaŭ grupoj estis metitaj sub la sama klinika kaj kuraca reĝimo, kun la sola diferenco, ke al la infanoj de unu el la grupoj oni regule disdonis poŝtmarkojn kaj bone klarigis al ili la manieron de ordigo.

Post la fino de la eksperimento oni konstatis tute certe, ke la infanoj de l' grupo, kiu okupiĝis pri filatelo, multe pli rapide kaj plene resaniĝis, ol la infanoj de la alia grupo.

La rezultoj de tiu ĉi eksperimento ege interesigis multajn kuracistojn el aliaj sanatorioj en Pollando kaj alilande. La rezultoj de la faritaj eksperimentoj estis pli ol kuraĝigaj. Oni konstatis, ke la okupoj pri filatelo estas ne nur kultura, sed ankaŭ kuracofika.

La kuracado de malsanaj infanoj krom per aliaj kuracrimedoj ankaŭ per filatelo estis diskutata ĉe la XV-a kongreso de la eŭropaj naciaj komitatoj de l' internacia speciala fonduso por helpado de la infanoj ĉe UNO (UNICEF). La filatelo kiel sukcesa eksperimento por kuracado de malsanaj infanoj estis rekomendita kaj nun oni kun sukceso ĝin praktikas en multaj infansanatorioj.

DONACIOJ



Saxer Ebeltoft en Arendal kaj Klubo Esperantista en Oslo sendis al ni uzitajn poŝtmarkojn, pro kiuj ni kore dankas. La plejparto estas jam monigitaj. Ĉar la preskostoj kaj ankaŭ aliaj elspezoj kreskis sufiĉe multe, ni estas feliĉaj pro ĉiu krono, kiun vi per poŝtmarkoj metas en nian kason. Koran dankon!

LA BUTIKO

Ni deziras denove atentigi pri nia butikoj. De tempo al tempo iu aĉetas kelkajn poŝtmarkojn. Se vi ne mem kolektas poŝtmarkojn, ĉu vi ne havas knabeton en la familio aŭ inter la najbaroj? Por lia naskiĝtago aĉetu el nia stoko. Kaj memoru: Vi povas aĉeti por po 20 øre, vi povas aĉeti pakajetojn por po 5 kronoj - ĝis centkronajn pakajetojn. Ni povas havigi markojn kun bestoj, birdoj, ĉevaloj, ŝipoj, pentraĵoj k. a. laŭ via deziro. Guste nun ni havas stokon de aŭstriaĵ pm. Indiku nur, kion vi deziras. La monon vi sendu ĉiam nur al la redaktoro en Sarpsborg, kaj vi povas pagi per neuzitaj norvegaj aŭ svedaj poŝtmarkoj.

 H e l s i n g ø r
 mmmmmmmmmmmmmmmmmmm
 La internaciaj feriaj Esperanto-kursoj okazos denove en 1973 (22.- 29. de Julio) en la Internacia Altlernejo de Helsingør. Ni invitas vin veni por ceesti - kaj pasigi neforgeseblajn tagojn en internacia rondo. Programo estas senpage havebla ĉe
 L. Friis
 Ingemannsvej 9,
 DK-8230 ÅBYHØJ,
 Danlando.

Oslo

5.9.72. Nia prez. Annalise Rees deziris al ni bonvenon en nova kunveno: St. Olavshuset, Osterhaus' gate 27.

Kiel vortojn por pripenso Annalise Rees legis poemeton de Marjorie Boulton, "La Hirundoj".

Rolf Bugge-Paulsen amuzis kaj tre interesis nin per vivanta raporto pri la UK en Portland.

Lovise Bøe ĵus partoprenis la kursojn en la Altlernejo en Elsinoro kaj transdonis al ni salutojn de ĉiuj partoprenintoj, 125 el 12 nacioj. Okazis du kursoj kaj unu studrondo krom kurso por infanoj. Ŝi rakontis pri la diversaj temoj kiujn oni diskutis. Estis facile konstati per ŝia flua prezento al ni ke ŝi profitis je la agrabla restado en Elsinoro. Varme ŝi rekomendis al aliaj partopreni similiajn aranĝojn.

*

18.9.72. Vortoj por pripenso ĉi foje estis: "Se viro, estu viro.." de Sandor Petöfi. Legis Annalise Rees.

C. Stöp-Bowitz rakontis kaj montris lumbildojn pri sia restado en Lieĝo okaze de la unuaj Someraj Universitataj Kursoj.

John Berggreen raportis pri la sukcesa Esperanto-ekspozicio dum Skolta Landa Tendaro en Rörös. Ni dankas kaj admiras nian klubanon pro lia bonsukcesa laboro por Esperanto inter la skoltoj. Pepita

*

3.10.72. Nia prez. Annalise Rees bonvensalutis kaj laŭlegis iomete pri la Viena Konferenco 23-30.7.72 el ĵurnalo. Vekis intereson precipe jena parteto: "El la deko da amatoraj kaj profesiaj filmoj la publiko, transformita en jurion, elektis kiel plej bonan, spritan, la filmon pri Oslo, la norvega ĉefurbo".

Pepita de Caspary estas dum multaj jaroj fervora auskultanto de Esperantaj radio-elsendoj. Ŝi laŭdis la bonkvalitajn elsendojn de la Pola Radio kaj de Radio Berno, Svislando, kaj aŭdigis sonbendaĵajn specimenojn de: leterkesto, koncerto kun bondeziroj (kun altkvalitaj kantoj en Esperanto), Esperanto-ekspreso, pri novaĵoj kaj kulturaj programoj. Fervore ŝi instigis al aŭskultado. Ŝi estas aktiva persono, kiu meritas la elkoran dankon kiun ŝi ricevis dum la "leterkesto" de Pola Radio. Kaj ne nur Pepita estas aktiva, - ankaŭ nia juna membro Stella de Caspary scipovas skribi leteron pri la ĉiutaga vivo en la kvara klaso de la elementa lernejo, leteron kiu kompreneble entuziasmigis la parolistojn en Pola Radio.

Kirsten Ek

*

16.10.72. John Berggreen legis mem-verkitajn "vortojn por pripenso". La temo estis lingvaj problemoj kiujn kreas la fakto ke Esperanto ofte similas al aliaj lingvoj, gepatraj aŭ fremdaj. Al komencantoj tio ofte kaŭzas konfuzon kaj dubon.

Inger Richard kunportis florpotojn kaj humon. Ŝi montris kiel oni plantas krokusojn en specialaj ujoj. Ankaŭ tulipojn ŝi plantis. Cetere ŝi montris kaj priparolis diversajn bulbojn kaj plantojn kaj kiel prizorgi ilin.

*

7.11.72. Grava evento hodiaŭ estis ĵus eldonita "Malŝlosilo", kiun C. Stöp-Bowitz prezentis al ni.

Letero de nia Orienta Distrikto estis laŭlegata kaj poste vigle diskutata.

Otto Prytz gvidis divenkonkurson inter 3 inoj kaj 3 uloj. Venkis kompreneble la inoj!

Artikolo pri Neŭtraleco el Dana Esperanto-gazeto Eño, prezentita kiel Vortoj por Pripenso de Annalise Rees, estigis viglan diskutadon.

20.11.72. Ĉeftemo estis la UK en Beogrado. - Kari Kalsås, nia klubano kaj profesia gvidantino de vojaĝoj, prezentis al ni sian proponon pri aŭtobusa karavano al Beograd. Ŝi ilustris tiun proponon per ĉarme komentariitaj lumbildoj.

Dum la kafo-paŭzo Pepita laŭlegis el gazeteltondaĵo kiun Ruth Herlofson kunportis. Temas pri Kjell Walraamoen, kies poemaro estis rifuzita de norvegaj eldonistoj, sed nun eldoniĝis je 3000 ekzempleroj en Italujo - kaj en Esperanto. - Tiel li atingos publikon multe pli grandan kaj internacian ol la plimulto de norvegaj poetoj.

*

5.12.72. Zamenhofkunveno dediĉita al la Libro-jaro.

Ci-vespere la klubo havis gaston, d-ron V. Zazvorka el Prago. Li rakontis interalie ke la klubo en Prago ĉi-jare festas la 70-an datrevenon de sia fondiĝo. Je lia instigo nia klubo sendis salutan karton al la jubilanto kun multaj subskriboj. Ni mire aŭdis ke la klubo en Prago kunvenas ĉiun mardon, sed ke nur malmultaj partoprenas la kunvenojn: li diris 80 aŭ 100!(?) Ĉar la junulara grupo ne sukcesis havigi al si kunvenojn, ili venas al ni, li klarigis.

C. Stöp-Bowitz prezentis cirkuferon de NEL. Speciale li atentigis pri la kampanjo por igi la bibliotekojn aĉeti pli da Esperantaj libroj, laŭ plano prilaborita de s-ino Matland kaj efektiva ekde januaro 1973.

"Vortoj por pripenso": Annalise Rees legis poemon de Heinrich Heine: "Doña Clara".

Pepita de Caspary legis eltiraĵon el Bulteno de Esperanto-Societo de Sabadell en Hispanujo pri la Internacia Libro-jaro. Poste ŝi legis version de Raymond Schwartz: "La diversaj aĝoj de l' homo".

Annalise Rees legis el la Skota Legendaro de Philipa Galloway.

Otto Prytz imponis kaj amuzis nin per novelo de Raymond Schwartz: "Pakaĵo el Ameriko".

Cetere ni pasigis agrablan tempon per komuna kantado, kaftrinkado kaj babilado.

Ke libroj vendiĝis por kr. 245, montras ke niaj klubanoj daŭre estas interesitaj legantoj. Pepita

Memor

La Norda Stelo havis Zamenhofan festeton 15-an de decembro en la hejmo de Alf Strömnass.

La prezidanto, Per Engen, deziris bonvenon. Pri Zamenhof, pri Esperanto kaj pri la interna ideo elegante paroladis Kåre Bye. Ĝojigis nin muziko prezentata de Ester Bye per piano, de Johs. Lund per aldviolono kaj de Kåre Bye per violono. Elise Koller montris lumbildojn kaj rakontis pri sia restado en Mallorca la pasintan aŭtunon. La lotumado havigis al la kluba kaso kr. 25,-. La prezidanto dankis al Ingrid kaj Alf Strömnass pro la bela aranĝo, pro delikata regalaĵo, entute pro tre ĉarma vespero. La geklubanoj varme aliĝis al tiu danko.

Ekino

Haugesund

MARA VENTO okazigis sian unuan postferian kunvenon la 14-an de septembro. Bonvenigis la prezidanto, dezirante sukcesan laborsezonon.

La programo temis pri la grandega metropolo Nov-Jorko, kaj programulino estis Klara Dahl. Vigle ŝi rakontis pri impresoj kaj travivaĵoj en la urbejo, kie ŝi vizitis parencojn. La rakontadon ŝi akompanis per granda nombro da tre belaj kaj plaĉaj kolor-lumbildoj.

Kurso okazonta en la kadro de Folkeakademiet estis priparolata.

*

La 12-an de oktobro la prezidanto bonvenigis novajn kaj malnovajn geanojn al kunveno en la kutimaejo. Post la enkonduka kanto li donis informojn pri la nova kurso daŭriga kaj sciigis ke funkcios ankaŭ nova rondo de komencantoj. Plue li informis pri la tre sukcesa Esperanto-renkontiĝo sur Haukelimonto, kiun partoprenis duoncento da geanoj.

Programuloj estis O. J. Rønnevig kaj O. Thormodsen. Ili prezentis kolor-filmojn pri kongres-vojaĝo al Usono kaj posta rondveturo tra 7 ŝtatoj per aŭtobuso.

Inter ne forgesblaj travivaĵoj estis vizito en Grand Canyon, la fama natur-miraklo kun mirindaj mont-formacioj kaj kolorspektroj. Tut-taga restado en Disneylando

ankaŭ estis kolorplena kaj amuza travivaĵo.

La prezidanto direktis al la ĉeestantoj admonon ke oni dum la aŭtuno kaj vintro diligente pruntu Esperantajn librojn en la urba biblioteko.

*

La novembro kunveno okazis la 9-an kaj tiun partoprenis ankaŭ anoj de la nova komenca kurso, al kiuj la prezidanto direktis apartan bonvenigon. Sekvis referaĵoj, kaj oni elektis aranĝan komitaton por festa kunveno antaŭ la Kristnasko.

Jurnalisto H. Holst-Roness estis la ĉefa programulo de la vespero. Tre interese kaj instrue li rakontis pri la gazetaro - ekde la antikvaj informiloj primitivaj ĝis la hodiaŭaj teknike evoluintaj presorganoj. La programulon la ĉeestantaro dankis per forta aplaŭdo.

Cetera estis vigla kantado, pianmuziko k.t.p.

Ref.

Hans Amund Rosbach eldonis:

CENT HIMNOJ

Kolekto de himnotradukoj ĉefe el norvega kaj dana origino, sed ankaŭ el aliaj lingvoj.

PREPAROJ AL DISERVO

Tre mallongaj kaj koncizaj edifoĵoj por ĉiu labortago inter advento kaj pasko kun konvena himno por la sanktotagoj.

VENNEHILSEN

Norveg-lingvaj himnoj originalaj kaj tradukitaj

EL PROPRA KAJ FREMDA

Tradukita kaj originala literaturo, prozo kaj poezio. La tradukita ĉefe el la norvega.

I FØRSTE REKKE

Norveglingvaj prediketoj laŭ la bibliotekstoj de la eklezia jaro.

Mendeblaj ĉe

ESPERANTOFORLAGET A/S
(Eldonejo Esperanto A/S)

aŭ ĉe la aŭtoro.

Recenzoj

P. KORTE: "SUB LA VERDA STANDARDO" LABORILO II (Kr. 10, ĉe Esperantoforlaget)

Ĉi tiu dua laborilo estas egale bona kiel la unua, instrua, klara kaj kun sistema progreso. Ĝi donas tre ilustran enkondukon al la gramatikaj malfacilaĵoj, enhavas variajn taskojn, lokojn por skribi solvojn, kaj diversajn ludojn, kiujn infanoj ĉiam tre ŝatas.

La desegnaĵoj estas klaraj, kaj ili bone komprenigas al la leganto la signifon de la novaj vortoj. Vortlisto en la fino de la libro, kun indiko de la paĝo en kiu aperas la vorto unuafoje. Entute: bona lernolibro, tre rekomendinda laŭ pedagogia vidpunkto.

P. KORTE: "SUB LA VERDA STANDARDO" GVIDILO (Kr. 11, ĉe Esperantoforlaget)

Por ambaŭ laboriloj la aŭtoro ellaboris gvidilon. Li antaŭvidas ke ne nur profesiaj instruistoj utiligos la lernolibrojn. Pro tio li donas valorajn konsilojn koncerne la instruadon en ĉi tiu gvidilo. Ĝi donas sugestojn kaj ideojn por la instruado, proponojn por bonaj demandoj kaj formoj de ripetado, kaj ideojn por variaj skribaj taskoj.

Ĉi tiu gvidilo estas vere tre utila, ankaŭ por la profesia instruisto, ne nur por la amatora.

Ĉiuj tri libroj (eldonitaj de Dansk Esperanto-Forlag) estas inter miaj plej bonaj lernolibroj laŭ mia sperto. Krom tio la prezo estas tiel malalta, ke ĉiu esperantisto povas aĉeti ilin por kurso aŭ studrondo.

Elna Matland



Korespondu

Kiu volus interŝanĝi kun mi malnovajn jarkolektojn de "Norvega Esperantistaro" kontraŭ "Pola Esperantisto"? Skribu al: Zdzisław Glacjan, Skrytka 5, CIESZYN, Polujo

Seknaboj 13/14-jaraĵoj deziras korespondi kaj interŝanĝi bildkartojn. Skribu al ilia instruisto: L. Schödl, 195 NEURUPPIN, Rosa Luxemburg-Str. 27, D.D.R.

20-jara fraŭlo deziras korespondi kun norvegaj ĉeesperantistoj. Mi estas elektronika teknikisto, interesiĝas pri preskaŭ ĉiuj temoj! Sławomir Plesiański, ul. Okecka 88/69, WARSZAWA 12, Polujo.

Hungara lernantino deziras korespondi kun norvega lernanto de sesa klaso. Mária Dósa, ERSEKVADERET, Béke út. 24, Hungarujo.

28-jara fraŭlo, mineja teknologo, deziras korespondi kun norvegaj fraŭlinoj pri ĉiuj temoj. Kočíš Ján, Str. 29. Augusto 3/79, HANĀLOVÁ, okr. Prievidza, Ĉeĥoslovakujo.

Ni deziras korespondi kun la tuta mondo. Ni estas komencantaj lernantoj de la Esperantoklubo "Unueco", Krommenie/Assendelft, Nederlando. - Fraŭlinoj: Sandra Barentz, Badhuislaan 11, KROMMENIE (nask. 14-1-64) - Antonella Klingers, Industrieweg 3, ASSENDELFT (20-3-62) - Annemarie Klingers, Industrieweg 3, ASSENDELFT (5-11-63) - Miriam de Jong, Dorpsstraat 843, ASSENDELFT (6-1-64) - Joke Kuiper, Dorpsstraat 947, ASSENDELFT (1-1-64) - Wilma de Vos, Dorpsstraat 909, ASSENDELFT (19-12-62) - Crista Kef, Dorpsstraat 606, ASSENDELFT (8-8-64) - Anja Stam, Vaartdijk 39, ASSENDELFT (17-12-60) - Linde Stam, Vaartdijk 39, ASSENDELFT (13-2-62) - Fraŭloj: Jan van Gelderen, Dorpsstraat 841, ASSENDELFT (4-8-62) - Willy van Gelderen, Dorpsstraat



841, ASSENDELFT (15-11-63) - Hans van Gelderen, Dorpsstraat 837, ASSENDELFT (13-6-62) - Kees van Gelderen, Dorpsstraat 837, ASSENDELFT (28-3-64).

Ĉi-sube membroj kiuj ankaŭ deziras korespondi kun la tuta mondo: F.ino José Tromp, Dorpsstraat 820, ASSENDELFT (nask. 22-10-58). Ŝi lernas por kudristino, ŝatas modernan muzikon, estas tre sportiva knabino. - Gabriëlle Klingers, Industrieweg 3, ASSENDELFT (14-3-58). Moderna knabino. Amas ĉevalojn. Laboras en maneĝo. Bonega rajdantino. - Mieke van Belzen, Vaartdijk 35, ASSENDELFT (10-7-57). Deziras korespondi kun multaj diversaj landoj pri junulaj aferoj, muziko, danco, sportoj, ktp. - Loeky Okel, Zaanweg 125, WORMERVEER (28-9-47). Ŝi estas gvidantino de grupo kiu folklore dancas. Kolektas poŝtmarkojn, pupojn en nacia kostumo. Turiste vojaĝi. Ŝi laboras en turisma oficejo. - S.ino A. Meer, Deken Schmidtstraat 12, KROMMENIE (23-1-42), S.oro J. Meer, Deken Schmidtstraat 12, KROMMENIE (3-7-40). Sportivaj geedzoj. Teniso kaj aliaj sportoj. Turisme vojaĝi al eksterlanda Esperantistoj. Kolektas poŝtmarkojn, pupojn

Universala Esperanto-Asocio

58-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Beograd, 28.7. - 4.8. 1973

Lingva ekzameno

La Internacia Ekzamena Komisiono denove ekzamenos kandidatojn okaze de la Universala Kongreso. Ĉiu intereso povas peti detalojn ĉe la sekretario, D-ro J. C.Wells, 17 Ashbourne Terrace, London SW19 1QX, Britujo. La limdato estas la 1-a de majo 1973.

Antaŭkongreso en Ljubljana

La Esperanta Societo en Ljubljana, interkonsente kun la LKK, organizas de la 24-a ĝis la 27-a de julio 1973 3-tagan programon kun ebleco de posta komuna vojaĝo al Beograd. Detaloj aperas en la Oficiala Bulteno (Dua).

Alloga programo en Ateno

La postkongresa komitato en Ateno (Grekujo) preparis riĉan kulture-turisman programon de la Oficiala Postkongreso 1973. La partoprenantoj ĝuos konatiĝon kun la monumentaj verkoj de la antikva greka civilizo, renkontotajn precipe dum la ekskursoj, fakaj prelegoj kaj teatraj prezentadoj. Plenaĵ detaloj aperas en la Oficiala Bulteno (Dua).

en nacia kostumo. - S.ino C.Vooren, Canevaralstraat 21, KROMMENIE (34-jara). Hobiaj: kuirado, promenado, kolekti poŝtmarkojn, pupojn en nacia kostumo. Vojaĝi eksterlande al Esperantista familioj. - S.ino B. v. d. Pol, Teresjkowastraat 15, KROMMENIE. Instruistino en Esperanto kaj angla lingvoj. Kolektas bildkartojn kaj poŝtmarkojn. - F.ino Marga Dudink, Dorpsstraat 843 b, ASSENDELFT (20-9-50). Sportiva, ŝparema f.ino ĉar sekvontan jaron ŝi edziniĝos kun farmisto. - F.ino Ria de Jong, Dorpsstraat 843 a, ASSENDELFT (26-3-40). Instruistino de la judosporto. - S.ino Klazien Jongstra, Krommenieerweg 269, WORMERVEER (15-9-29). Vidvino. Havas cigaretbutikon. Hobiaj: Esperanto-korespondo, ricevo de gajaĵ leteroj. - F.ino Nettie Buis, Berkenstraat 7, KROMMENIE (25-11-57) kaj f.ino Margo Sminia, Burg Mosselstraat 43, KROMMENIE (29-1-58). Ili ŝatas tamburi, muzikon, sportojn. Ili studas por oficistino.

Esperantoklubo "Unueco"
Krommenie/Assendelft,
Sekcio Korespondo,
Dorpsstraat 843,
ASSENDELFT, Nederlando



NORSK ESPERANTO-FORBUND (Norvega Esperantista Ligo)

Postadrese: Boks 942, Oslo. Postgiro 100.30
Kontoradresse: General Birchs gate 30, Oslo
Telefon: 69 14 39
Kontortid: Tirsdag og fredag 15.30-16.30
Turisma Servo: Boks 942, Oslo
Postgiro 100.32

ESPERANTOFORLAGET A/S (Eldonejo Esperanto A/S)

Postadrese: Boks 942, Oslo. Postgiro 100.30
Kontoradresse: General Birchs gate 30, Oslo
Telefon: 69 14 39

Ĉefdelegito de U.E.A.:
S-ro Alfred Skyberg, Østensjøvn. 118 a,
Oslo 6. Postgiro 133.29

La redakcio:
Johan Hammond Rosbach,
Hulderveien 17 B, N-1700 Sarpsborg.
Telefona: 54 727

Ekspedejo de Norvega Esperantisto:
Boks 942, Oslo 1.